

Joseph Düpjohann,
Dat Wiägekrüüs

Staiht'n Krüüs an diene Wiäge,
dan holl stillkes in un biär,
alle Straoten in dien Liäben
kuemt van Guott alleene hiär.

Klaine Krüükse, graute Krüsse
staohť an dienen Wägg,
unner iähre Drägt maggs stüenen,
mannigeen tosammenbräck.

Sau wu He de Dääonenkraune
liedsam up'n Hööfte drog,
niemm dien Krüüs to läter'm Laune
met up diene Liäbenstraot'.

Wiägekrüüse dat sind Teeken,
de van Mensken wuorn upstellt
üm dem Ähre to erwiesen,
weck is un blifft de Häer der Welt.

Daorüm follte diene Hänne
still vüor jeedet Wiägekrüüs,
bidd' Em üm een siälig Enne,
wat den Hiemel di beschiärt.

*Verkinto de tiu ĉi Basgermana poemo estas JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18), publikigita 2004-10-13.*

Arg-272-550 (2005-09-18 12:07:33)

*La poemo aperis la 13an de Oktobro 2004 en loka gazo
to "Die GLocke", okaze de la inaŭguro de renovigita voj-
krucifikso starigita ĉe la strat-angulo "Warendorfer Straße
- Rote Erde" en Oelde, Germanio.*

Joseph Düpjohann,
La vojkruco
tradukita de Manfredo Ratislavo

Se renkontas vi voj-krucon,
vi ekhaltu, preĝu vi;
ĉiu strat' en via vivo
venas sole ja de Di'.

Kruc' dum via vivo-vojo
ofte ege premas vin;
kaj ĝemante ĝin portante
multaj ne eltenas ĝin.

Same kiel Li la dornan
kronon portis kun sufer',
prenu vian krucon vi sur
via vojo sur la Ter'.

Vojo-krucoj estas signoj,
starigitaj por honor'
de ĉi tiu, kiu estas
de la mondo la Sinjor'.

Tial antaŭ vojo-kruco
manojn interplektu vi;
preĝu, ke benitan finon
grace donu al vi Di'.

*Traduko de la Basgermana poemo "Dat Wiägekrüüs" de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-272-551 (2005-01-17 13:54:37)